L'ESPLUGA DE FRANCOLÍ

23a - 25a Februaro



KONGRESLIBRO

Joventut Catalana d'**Esperanto**
*Kataluna **Esperanto**-Junularo*

AJUNTAMENT DE
l'Espluga de Francolí

Bonvenon al L'Espluga de Francolí, kara samideano!

La Organiza teamo de la RenKEJtiĝo kaj la Kataluna Esperanto-Junularo ĝoje bonvenigas vin al nia dua eldono!

La RenKEJtiĝo intencas esti la plej multnombra renkontiĝo organizita de la Kataluna Esperanto-Junularo, pensita por junaj esperantistoj ne nur el Katalunio, sed ankaŭ el eksterlando. La nomo devenas de vortludo inter la Esperanta vorto 'renkontiĝo' kaj KEJ, kiu ĝin organizas. Lastatempe, katalunaj gejunuloj komencis plimultiĝi en Esperantujo kaj oni bezonis renkontiĝon por interkonatiĝi kaj esti konataj eksterlande. Dum ĉi tiu semajnfino ni preparis plurajn aktivaĵojn: ekskursoj, prelegoj, gvidata vizito, partoprenludoj... Ĉio en Esperanto!


Ni fortege laboris dum monatoj klopodante oferi al vi mojosan aranĝon por montri kiel agas KEJ kaj kiom viglas Esperanto en Katalunio. La RenKEJtiĝo estas rezulto de teamlaboro, kunsidoj, vizitoj al L'Espluga, noktoj irante dormi malfrue, retpoŝtoj, energio, korektado de eraroj, personaj alportoj, ĝojo, espero... Kaj tio ĉion tradukeblas en kio ajn okazos dum tiu semajnfino.

Ĝuu, ridu kaj amuziĝu!

Benvinguts a L'Espluga de Francolí,

La Organiza teamo de RenKEJtiĝo kaj KEJ.

Programtabelo



Programo

La temo de RenKEJtiĝo 2024 estas **Historia Memoro**. Ĉi tiu temo tre kongruas kun la gastejo, ĉar ĝi estis la scenejo de la adiaŭo al la Internaciaj Brigadoj dum la Hispana Enlanda Milito. Ni neniam ĉesu lerni kaj memori la pasintecon, ĉar koni la Historion estas esence por konstrui vivindan estontecon.

Vendredo la 23-a

Promenado al Tossal de la Creu:

Ekde la 16h00, elirante el la Gastejo, ni okazigos promenadon al Tossal de la Creu, vizitinda naturejo kie oni povos profiti por ĝui la vidindaĵojn de la urbeto Vimbodí i Poblet, L'Espluga kaj la Monaĥejo de Poblet. Revenante, ni prenos alian vojon kaj iros reen al la gastejo, atingante ĝin proksimume je la 18h30.

Interkona vespero:

Jen via ŝanco ekkoni la aliajn partoprenantojn. Dum unu horo ni faros kelkajn agadojn kie vi povas paroli kaj amuziĝi renkontante novajn homojn. Ni komencos post la ekskurso, pli-malpli je la 19-a.

Trinkomanĝa nokto kaj kataluna vespermanĝo:

Je la 20-a komenciĝas klasikaĵo de Esperanto-renkontiĝoj! Vi povos manĝi tipajn hispanajn kaj katalunajn manĝaĵojn kaj samtempe provi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el la diversaj devenlandoj de la partoprenantoj.

Sabato la 24a

«Stefan Zweig, eŭropa verkisto»

Prelego de Arno Lagrange je la 10a. Ni ekkonos la verkiston Stefan Zweig, lian vivon, lian verkaron kaj liajn ecojn homajn psikologiajn, filozofiajn, kun emfazo de lia humanisma sinteno, sin difinante ne kiel iu naciano, sed kiel eŭropano, kaj eĉ mondcivitano.

La prelegon gvidas aro da bildoj: personaj fotoj, portretoj, frontpaĝoj de libroj, mapoj, skemoj kiuj helpas konatiĝi kun la travivaĵoj de la aŭtoro, kaj komprenigi la apartajn ecojn de lia verkaro.

«Starigi studentan E-klubon: eĉ vi povas!»

Ateliero de Albert S. Garrido je la 11:15a. Oni diras, ke lernejoj estas kreskejoj kaj florejoj de ideoj kaj interesoj. Ĉu Esperanto kresku kaj floru ankaŭ en via lernejo? Kiel komenci la kompleksan procezon fondi kaj poste vivteni studentan klubon? Partoprenu en ĉi tiu mallonga ateliero por doni al vi la puŝon ĝuste en tiun direkton, ĉar eĉ vi povas starigi la vian.

«La internaciaj esperantistoj en la hispana milito»

Prelego de Javier Alcalde je la 16a. La germano Ludwig Renn, la dano Åge Kjelsø, la italo Piero Pasquotti, la skoto Sidney Quinn, la sloveno Matija Gržina, la ukraino Owadja Kupperman, la bulgaroj Nikola Mladeno kaj Mikaelo Langof, la poloj Władysław Lekowski, Jakub Aronowicz kaj

Józef Tennenbaum, la rumanoj A. Berlo, Mechel Stanger lak Berl Kurtz, la aŭstroj Franz Jaritsch, Franz Heiderer, Franz Schick kaj Eduard Pfeifer, la francino Marguerite Aspès, la anglino Winifred Bates...

Kiuj estis la internaciaj esperantistoj, kiuj venis al la hispana milito? Kiom da ili estis? El kiuj landoj ili venis? Kian ideologion ili havis? Kiomgrade Esperanto gravis en ilia sperto?

Ni provos respondi tiujn demandojn pere de serio da vivovojoj, kiuj entute evidentigas la diversecon, sed ankaŭ la viglecon de tiu komunumo de transnaciaj idealistoj, montrante samtemtempe iujn komunajn tendencojn.

«Preter pacifismo: etiko en tempoj de milito»

Filozofa debato je la 19a. Pacifismo estas unu el la ideoj historie asociitaj kun la Esperanto-movado kaj la interna ideo de Esperanto. Kune ni rigardos la evoluon de la percepto de pacifismo kaj ĝia kritiko. Ni konsideros ĉu kaj kiam mortigo povas esti morale pravigita kaj legos tekstojn de elstaraj filozofoj tradukitaj speciale por ĉi tiu okazaĵo.

Sesio de rolludoj

Danke al la kunlaboro kun Associació ĜUO el Reus, ni havos vesperan ludsesion pri rolluloj en Esperanto! Krome, samtempe disponeblos trinkejo en la sama loko.

Niaj partoprenantoj havos la eblecon ludi premiere unikan novan rolludon kreitan de Toni Espinosa originale en Esperanto: Tempogardistoj. Li estas fondinto de la asocio

pri tabloludoj kaj Esperanta kulturo ĜUO, kaj iĝos ludestro dum la ludvespero.

Dum la vespero la Salono KEJ iĝos ludejo kie eblos ludi 3 malsamajn rolludojn en Esperanto kreitajn de la asocio Ĝuo (inkluzive de Tempogardistoj), sed ankaŭ estos disponeblaj multaj aliaj tabloludoj. Vi eĉ povas kunporti proprajn ludojn!

Dimanĉon la 25-an

Ekskurso al Monaĥejo de Poblet:

Dimanĉe, la 25-an de Februaro ekde la 10h00, elirante el la Gastejo Xanascat de l'Espluga de Francolí, ni ekigos la promenadon per la vojo al Monaĥejo de Poblet! Unu el la plej gravaj arkitekturaj kaj monaĥaj kompleksoj en Eŭropo, dum jarcentoj la abatejo fariĝis proksima kaj grava ligo al la historio de Katalunio. Aldone, la vizito estos gvidata per niaj ĉiĉeronoj Jordi Solsona kaj Jordi Calafí, aktivuloj en la junulara eo-movado. Revenante oni atingos la gastejon je la 12h-12h30 por preni la bagaĝon. La prezo por enigi la monaĥejon estas 6,50€ por studentoj kaj 8,50€ por ne studentoj, pagita kune kun via kotizo.

Foriro

Post la vizito al la monaĥejo ni denove haltos ĉe la gastejo por kolekti niajn pakaĵojn (matene oni devas lasi la ĉambrojn malplenaj kaj ni lasos la pakaĵojn, kie ni indikos la saman tagon). Je la 13:00 ni ĉiuj devas esti ekstere.

Ĉi tie finiĝas la kongreso, sed ĉiuj, kiuj konfirmis sian partoprenon, venos kun la LKK por manĝi calçots!

Pri KEJ



Kataluna Esperanto-Junularo estas la junulara Esperanto-organizo de Katalunlingvaj teritorioj. Neformale fondita fine de la 1970-aj jaroj, ĝi formale ekfunkciis en 1981 kiel sekcio de Kataluna Esperanto-Asocio kaj ekeldonis la revuon *Kata Luno*. En 1988 ĝi fariĝis, inter multaj ebriaĵoj, Landa Sekcio de TEJO!

Post vigla aktivado ĝis la komenco de la 1990-aj jaroj, ĝi stagnis ĝis ĉirkaŭ la jaro 2000, malgraŭ en 2005 kaj je la komenco de la dekaj jaroj novaj generacioj de aktivuloj el Katalunlingvio intencis relanĉi la organizon, sensukcese.

Ĉirkaŭ 2018 nova generacio de aktivuloj refondis KEJ, kaj post grandaj klopodoj, nia asocio jam viglas kaj sukcese disvastigas Esperanton en Katalunio nuntempe pere de regulaj okazaĵoj kiel eo-kursoj, bierumadoj kaj internaciaj projektoj.

Ĉu vi sciis...?

Laŭ lastaj sciencaj raportoj, KEJ estas unu el la Esperantaj Junularoj kun plej alta indekso de Krokodilado. Ĝi estas ofta kutimo inter siaj membroj (krom Siru). Malgraŭ tio, spertuloj ankaŭ indikis, ke ekzistas rilato inter krokodilado kaj mojoseco, specife en Sud-Eŭropaj junularaj asocioj.

Listo de aliĝintoj

Pol	Katalunio
Jordi Calafí	Katalunio
Ĵordi Solsona	Katalunio
Lucía	Katalunio
David	Katalunio
Oskar	Katalunio
Ĝovanni	Italio
Ana	Germanio/Brazilo
Albert S. T. Garrido	Filipinoj/Hispanio
Raül	Valencilando
Adamo	Pollando/Silezio
Diego Fernandez	Hispanio/Brazilo
Lu	Svisio
Diego	Italio

Alumeto	Katalunujo
Michael-Boris	Eŭropa Unio
Pako	Leono – Hispanio
Krišna	Katalunio
Siru	Katalunio/Finnlando
Ĝulja	Italio
Manel Jaume Sales Carda	Katalunio
Karlos	Sennaciulo
Anne Roumanœuf	FramaDate
Lea	Francio
Ameli	Okcitanio
Lemon, Lime	France
Gabrjelo	Pastlando
Arno Lagrange	Okcitanio
Johnnie Gallacher	Skotlando

Yentl-Rose	Mirlando
Maria	Grekio
Sandra	Katalunio
Djoumlati	komoro Insuloj
Vilhelmo SAGO	Katalunio
Lourdes González	Catalunya
Mon Cardona	Kataluna Landaro
Silvia Soler	Catalunya
Daĉjo	Italio
Xavier Rebled Marín	Katalunaj Landoj
David	Atlantido – Hispanio
Ruth	Segovio – Hispanio
noa	Catalunya
Isaac	Katalunio
Jaume	Katalunio

Frico	Germanio
Etienne	Francio
Inés	Toluko, Meksiko
Jaime	Ekstremaduro
Salvatore	Italio
Emma.v	Francio
Gerard Sugranyes	Katalunio
Xavi Alcalde	Katalunio
Saioa Garcia	Katalunio

Pri Loka Kongresa Komitato

Kontaktu nin kaze de problemoj aŭ gravaĵoj. Se via dubo solveblas per tiu Kongreslibro, bonvolu legi ĝin antaŭ ol telefoni. Moltes Gràcies!

- Jordi Calafí : @jordi_calafi (+34 639 686 797)
- Lucía M. Fernández : @lucifdez17
- Òscar Hernández : @oscar_h_r (+34 683 52 75 13)
- David Ruíz : @DavidoEO (+34 628 576 438)
- Pol Jiménez : @poljisach (+34 695 14 45 64)
- Jordi Solsona: @jordisol1
- Isaac Giménez: @Isaac_GC